IIIa Jaro 1905-06 JULIO N° 30

Espero Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

Direktoro P-o Em. PELTIER

Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) **France**

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj unr al la Direktoro. Manuskriptoj neniam estos resendataj.

« Unum ovile et unus pastor». — (*Johan X. 16.*)
« Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto.»

ABONEJOJ de E K.

FRANCLANDO : Ĉe la Direktoro de E. K., kaj ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacèpède, Paris V°.
ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater. LONDON.
BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.
BOHEMUJO-AŬSTRIO F. Topič. libr. Ferdinandova 9. Praha.
ĈILILANDO : S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.
HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO. —
ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRICO DI PORDENONE (*Udine*).
HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.
GERMANLANDO Moller et Borel, 95, Prinzenster. Berlin.
POLUJO Arct. libr. Nowy Swiat, 53, Warszawia.
RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjaĉeskaja, 24, log. 12. S. Peterburgo.

Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro.



PRESEJO A. BARBOT
15, Rue Etienne-Pallu, 15
TOURS. (TUR') FRANCE

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara : En Franclando : 4 frankoj. Ekster — 5 fr. | **Unu numero :** 0 fr. 50, afrankite.

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en augusto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4na paĝo: 4 fr. ; 8na paĝo : 2 fr. 50 ; 16na paĝo: 2 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : por tri fojoj 10 °/₀ ; — por ses fojoj : 15 °/₀ ; — por 10 fojoj : 20 °/₀

CIDRNULINO, KUN SES ILUSTRAĴOJ

N-o DUA DE LA ILUSTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO por infanoj.

ĴUS APERIS 0 fr. 50 afrankite.

KATO KUN BOTOJ kaj CINDRULINO kune mendataj kostos nur 0,75, afrankite.

HO, MIA KOR : Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof. Muziko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo : 1 fr.

BALDAU AĈETEBLAJ

En songo, poezio de *D-ro Zamenhof*, muziko de S-ino *Josée Guivy* ..... 1 fr. 60

Himno, poezio de *Profesoro Dombrovski*, muziko de S-ino *Josée Guivy* ..... 1 fr. 50

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(*La tuta kolekto ĝis marto 5 fr. afrankite*). **Artikoloj legindaj en la kolekto :** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée skizo ; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecionoj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj kaj informoj pri la 1-a Kongreso Esperantista. ktp. ktp.

ESPERO KATOLIKA

ENHAVO Pagoj

Abato A. Richardson : Visito al Doktoro Pusey.... 129
P-o Van Ovelen : Unuiĝo de kristanaro..... 132
Paĝo de la gelegantoj : F-ino Stribik kaj F-ino Devoucoux..... 133
Pierre L'Ermite : Mirinda aventuro (sekvo). — Trad. P. C..... 135
Eleda kaj Vinko : La lasta Abenceraĝo (sekvo)..... 140
Paĝo de l'Direktoro..... 145
En Esperantujo : Pri la literoj Supersignitaj.— Rondirantaj gazetoj. — Notetoj. — Bibliografio. — Abonmonoj ricevitaj. — Monoferoj. — Ŝakoj. 147-150-151-155-158

VIZITO AL DOKTORO PUSEY

Inter la nomoj kunigitaj kun la mirinda movo al katolikismo, kiu fariĝas en la brusto mem de la Eklezio Anglikana, unu staros ĉiam en loko honora ĝi estas la nomo Pusey

Neniam ekzistis viro kiu deziris malpli ol li konsideriĝi kiel partiestro. Sen eĉ la ombro de ambicio, — rimarkinda pro lia simpleco, lia humileco, li ofte estis surprizita pro la bruo farata pri lia nomo. La mondo protestanta donis la nomon « Puseyisto » al la anoj de la nova partio angla katolika. Estas ja titolo de malestimo, sed ĝi montras tamen la influon de Doktoro Pusey, Ĉar mi memoras kun respekto kaj amo tiun belan kaj dolĉan personaĵon, — ĉar mi konfesas ĉion kion li faris por la sankta kaŭzo de l'Unuiĝo, — tial mi opinias ke la memorigo de vizito kiun mi faris ĉe D-o Pusey en la jaro 1865 interesos la legantojn de *Espero Katolika*.

Mi estis ĉe mia amiko S-o Le Geyt, pastro anglikana. Reciproka amiko, maljuna sinjoro belga nomata Detrie, estis kun ni. S-o Detrie estis laiko tre simpla, sen studoj, tamen tre klera en lia religio. Ĉu per liaj legadoj, ĉu per lia ĉeesto al multaj predikoj dum tuta lia longa vivo, certe estas ke li sciis la teologion katolikan pli bone ol multaj pastroj.

Post longa vizito tra la bela urbo kaj kolegioj de Oxford, ni, S-o Le Geyt, S-o Detrie, mi kaj iu *Fellow* de la kolegio de S. Magdaleno, kies nomon mi forgesas, alvenis ĉe la bèla hejmo de D-o Pusey. Li estis kanoniko kaj hebrea Profesoro ĉe la luksa katedra-kolegio de « Christ-Church ».

D-o Pusey ne estis simila je la pastroj anglikanaj nunaj. Li portis nek togon, nek kolumon romanan. Li similis plivole maljunan « *Clergyman* » de la estinteco. Lia larĝa frunto donis al vi la ideon de scienculo, de klerulo; sed la boneco de lia vizaĝo kaj la dolĉeco humila de liaj manieroj igis vin tuj senĝena. Mia amiko S-o Detrie estis je la sama speco. Li havis la ĝentilecon de l'dekoka jarcento. Estis plezuro vidi tiujn du belajn maljunulojn interŝanĝantajn tiujn signojn de konsidero, kiuj estas ĉe ili, certe, la rebrilo de siaj koroj kristanaj.

Mi prenis notojn pri tiu interparolado, kaj kvankam mi ne certigas raporti ĉion laŭvorte, tamen mi garantias laŭsence la akuratecon de ĉio, kion mi estas raportonta.

S-o Detrie komencis. Li diris ke li, simpla fidelulo katolika, nenian havis aŭtoritaton. Li sciis nenion krom sia katekismo. « Sed, respondis la Doktoro, » tio sufiĉas, via katekismo Meklina estas vera resumo de la teologio. Malmultaj anglikanoj scias sian religion, kaj la kelkaj katekismoj dogmaj verkitaj de pastroj privataj, antaŭ ne longe, nenian posedas aŭtoritaton. » Li daŭrigis : « ekzistas sendube diferencoj gravaj inter la du eklezioj, tamen laŭ mi, nenia protokolo oficiala de la anglikana eklezio neas kelkan dogmon de la eklezio Romana. Do mi opinias ke ĉion, kio estis difinita de la Konsilo « Trenta » povas akordiĝi kun niaj 39 artikoloj. Tio, kio malkunigas nin estas, ne dogmoj, sed iaj opinioj, tre ĝenerale akceptataj, ĉu de viaj, ĉu de niaj fideluloj ; sed, ĉar tiuj estas nur opinioj, ne dogmoj, ili ne devus esti nevinkebla barilo kontraŭ la reunuiĝo. Sed ĉe ni oni timas ke vi ne restos kontentaj de viaj nunaj dogmoj, kaj ke grade, tiuj opinioj iĝos artikoloj de via kredo ».

« Sed, respondis, S-o Detrie, S-o Doktoro, tio ne estas ebla. Opinioj neniam povus iĝi dogmoj. Eklezio nenion povas difini kiel *de fide* krom tio kio estas jam en la *Depositum fidei* de Dio rivelita. Certe Eklezio de Dio povas, kaj devas kelkafoje, difini pli klare, kontraŭ la atakoj de herezuloj, iajn dogmojn. Ĝi agis tiamaniere en konsiloj Nicea, Efesa, ktp. Vi ŝajnas forgesi, kara Doktoro, la promeson de Kristo, ke la spirito Ŝankta restus ĉiam ĉe Lia Eklezio por defendi ĝin kontraŭ ĉiuj eraroj. » — « Jes, konsentis la Doktoro, jes se la eklezio estus unuigita, videble

unu, sed ne parto; nur la tuta Eklezio, estas senerarebla. » S-o Detrie pensis ke estus pli bone ne daŭrigi pri la neerarebleco de la Eklezio. Li silentis.

Tial Doktoro Pusey klarigis lian opinion pri la estreco laŭ rajto Dia de l'ĉefpastro Romana, kiel la posteulo de Sankta Petro. Li kredis sincere en tiu estreco, kaj ke la celo de ĝi estas prezenti centron de Unueco. Li kredis ke tiu centro estas necesa por la *bone esse* (bonestado) de la Eklezio, ne tamen por ĝia *esse* (estado). Li aldiris ke se tiu estreco estus malvastigata kaj klarigata tiel, kiel ĝi estas instruata en la libroj de l'plej bonaj teologiistoj katolikaj, la interkonsento ne estus malfacila ĉar la anglikanoj kleraj sentas « profunde » la neceson de centro de Unueco.

Tiam la Doktoro paroladis pri tio kio, laŭ li, estas la plej granda « Crux » (kruco) por la anglikanoj. « Ne pensu, li diris, ke ni neas la *Komunion* de Sanktuloj, se ĝi restas malvastigata al ĉio kio estas komprenata per la formulo : *ora pro nobis*. Certe se ni volas resti fidelaj al nia alvoko al la Eklezio primitiva, se ni volas esti la infanoj de la sama eklezio kiel sanktaj Bazilo, Krizostomo, Jeronimo kaj Aŭgustino, ni devas kredi tion. Plue, eĉ en la katakomboj romanaj troviĝas alvokoj al sanktuloj ». Sed aldiris Doktoro Pusey, vi trograndigas, kara Sinjoro. Ĉe vi la uzado multe preteriras la dogmon de via katekismo. Vidu, mi petas, librojn, ekzemple, de S. Alfonso, de Grignon de Monfort, ktp.

S-o Detrie komprenis bone la malfacilaĵon, kvankam li diris poste al mi, ke ĝi nenian antaŭe prezentiĝis al sia animo. Li respondis « Aŭskultu, kara Doktoro, mi konfesas ke kelkaj el la paroloj kiujn vi montris al mi el tiuj libroj, ne povas esti akceptataj laŭlitere, sed, diru al mi ĉu via bela lingvo angla uzadas vortojn nur laŭ la senco severa, kaj preciza ? Ĉu la poezio, ĉu la amo infana ne ekzistas ankaŭ ? Ĉu la lingvo de tiu ĉi ne diferencas multe de la lingvo de l'scienculoj ? Nun, la teologio estas scienco, sed la preĝo estas la lingvo de l'amo. Kiam ekzemple ni preĝas al Mario, ni estas infanoj parolantaj al nia Patrino. Ne do analizu niajn vortojn. Plue se tio estas trograndigo, vi trovus ĝin ankaŭ ĉe la sanktuloj de l'Eklezio primitiva. » Kaj

S-o Detrie citis eltirajon el libro de S. Bazilo: Preĝo al sanktaj turmentitoj. Respondis S-o Pusey « Jes mi kredas facile ke ĉe homoj kiel vi, tiu danĝero ne ekzistas; sed ĉe la popolo neinstruata? »

« Kara Doktoro, diris S-o Detrie, kredu al mi; la popolo katolika estas malpli malinstruata ol vi opinias. Ĉe ni, en Belgujo, la malriĉa popolo kampara scias tre bone sian religion. La vere malinstruitoj estas la gehomoj modaj. Ĉe tiuj mi allasas ke la superstiĉo povas ekzisti; sed la kulpo ne estas alkalkulebla al la eklezio, ĉar ĝi ordonas al ĉiuj bone lerni la katekismon, kiu kondamnas ĉiujn superstiĉojn. »

Tiam Doktoro Pusey, pritraktis la dogmon de la S-ta Eŭkaristio. Pri tio lia kredo neniel diferencis de tiu de l'konsilo Trenta. Li bedaŭris la vorton « Transsubstanciiĝo ». Tamen li akceptis ĝin, ĉar li devis allasi, ke ekvivalenta esprimo estas akceptata de la Eklezio Greka. Laŭ li la transsubstanciiĝo kondamnita *vorte* per la 39 artikoloj anglikanaj, estas ne la kredo Trenta, sed ia vulgara eraro de tiu epoko.

Mi posedas aliajn notojn iome longaj pri mia vizito; sed mi opinias ke mi jam sufiĉe skribis por doni al la legantoj ĝustan ideon de tiu alta kaj simpatia personaĵo.

Laŭ mi, neniu en la Eklezio anglikana proksimiĝis pli ol D-o Pusey al la vero katolika. Mi diros plue, se la partio « *High Church* » nuna, estus konservinta la samajn opiniojn kiel tiujn de ĝia bedaŭrata Estro, la Unuiĝo de la du Eklezioj estus pli proksima ol ĝi estas hodiaŭ.

Faru Dio tre bona kaj tre kompata, kiu juĝas plivole la intencojn ol la agojn, ke lia animo akceptu la rekompencon por ĉio, kion li faris por multaj animoj (mi mem, inter aliaj) kiuj ŝuldas al li ilian ricevon poste en la vera Eklezio de Dio.

Abato AŬSTINO RICHARDSON.
Profesoro en la Instituto de l'Sankta Aloisio,
BRUSELO (Belgujo).

UNUIĜO DE KRISTANARO

ALTESTIMATA KAJ KARA KUNFRATO EN KRISTO

Pri la fondinda *Studa Societo* por paceme trafi la proponi-

tan celon de Unuiĝo kristanàra, oni ja devas elekti kampon tute neŭtran; kaj tial mi opinias kun aliaj ke la plej bona kaj sole ebla estas la kampo historia. Tiel agante, oni sekvas tute la vid-kaj ag-manieron de Lia papa Moŝto la granda Leono XIII^a, de pia kaj sankta memoro, kiu kun la sama celo ordonis ke la historia biblioteko en la Vatikano estu larĝporde malfermata por ĉiu ajn scienculo aŭ serĉanto, firme fidante kaj kredante ke la vero estos trovata laŭ historia vojo.

Certege por tiel granda kaj altdezirinda celo oni bezonas studi, serĉi, kompari, elekti, pesi, akcepti, eligi, pripensi. Sed tio ĉio neniel sufiĉas. La kredo ja povas trovi multe da helpo el tio ĉio: tamen, ĉar la kredo estas, ne trovaĵo de homo, sed donaco de Dio, kiu ĝin libere donacas al kiu li volas; estas vere ankaŭ alia rimedo tute ne malŝatinda nek forgesinda, nome la unuiĝo de *preĝoj*, por ke la Patro de l'lumoj bonvolu lumigi la eternan lumon de la eterna vero al ĉiuj kiuj havas sinceran voladon trovi la rektan vojon al la vero, kaj ne metas vole iajn barilojn.

Estus do treege dezirinde ke ĉiuj, kiuj deziras kunhelpi por atingi la diritan celon, ne nur studadu kaj verku, sed ankaŭ preĝadu ĉiutage fervore por peti la benon de Dio sur siajn laborojn ĉiu ajn ne nescias ke, sen la dia benado, vane laboras ili kiuj konstruas la domon de Dio kaj volas multobligi la loĝantojn en ĝi. Ni preĝadu do, ni studadu, ni verkadu, por ke niaj laboroj estu fruktodonaj por la granda Unuiĝo.

Jen estas kelkaj pensoj, kiujn mi submetas al la legantaro de E. K., sed aparte al ĉiuj kunlaborontoj por la granda celo.

Estu laŭdata J. K!

VAN OEVELEN, *pastro katolika*.

PAĜO DE LA GELEGANTOJ

Kian agrablan arton junulino devas preferi?

Jen kelkaj el la respondoj, kiujn ni ricevis pri tiu demando:

« Por ke agrabla arto estu (mi estis skribonta *perfekta*, sed la perfekteco ne loĝas en tiu ĉi mondo) preskaŭ perfekta, ĝi devas: unue esti plaĉeca al la junulino ĝin praktikanta, kaj plie ne malagrabla al ŝia ĉirkaŭanaro.

Arto agrabla povas esti difinita tiele: okupado bela, estetika

ne celanta profitan monon, kaj ripoziganta de la laboroj ordinaraj.

Kia arto agrabla do fraŭlino devas preferi ? Laŭ mi, estas tiu, kiu taŭgas al ŝia sekso, ŝiaj kapablecoj kaj ŝia situacio. Ni povas elekti inter laboroj kudrilaj, broderado, trikotado, kanvasado, hoketado ; ankaŭ muziko, desegnado, pentrado, eĉ fotografado.

Mi preferas simple... la hoketadon, ĉar ĝi estas okupado eksklusive *virina*, kaj mi opinias, ke estas saĝe fari uzon de la kapablecoj donitaj al ni de l'naturo. Plie ĝi estas nek korplaca, nek spiritlaca kaj en ĝi la lerteco de la fingroj ne malhelpas la elpens-spiriton : du ecoj kiuj ambaŭ povas naski verajn mirindaĵetojn, agrablajn por ŝi, kaj por tiuj, kiuj estas ĉirkaŭ ŝi. Fine oni povas pensi, aŭskulti kaj paroli agrable, hoketante.

Sed vi demandas min kion oni povas fari kun hoketilo (tiu ileto kvazaŭ kudrilo kun pinto hoka) kaj kelkaj volvaĵoj de fadeno, lano aŭ fadensilko.

O ! multe da aferoj, kiel vi tuj konos :

Belajn puntojn, kiuj ornamos riĉe kaj longdaŭre la tukvestaron de la hoketadantino ; beletan kaj luksan kolumon (imito de l'punto Irlanda, ĉar tia punto estas mode) kiu plibeligos ŝian korsaĵon aŭ estos bonvenata donaco por ŝia amikino ; la hoketilo povas sammaniere aliformigi la dolĉan kaj varmigan lanon en kapveston por la fraĉjeto, en robeton por la baptofilineto, en ŝalon por la maljuna servistino, en subjupon por la avino, ktp.

Kaj la ornemarto loĝeja ? tio estas ankaŭ taksebla, tiom pli ke, ekzemple, belegaj inter-tukoj puntaj por kurtenoj, ĉarmos la okulojn de la loĝantoj. Fine belaj kravatoj, el kotono kvazaŭ silka, diverskoloraj, faros plezuron al la paĉjo aŭ al la « granda » frato.

Eĉ oni povus almeti la hoketadon al la... Divenu ?... al la emblemo de Esperanto. Nenio estas ja pli facila. Kial ne fari, hoketade, beletan kadreton por fotografaĵo, stelforme ?... Do ĉar la hoketado estas agrabla por fari, kaj ĉarmante la libertempon ĝi povas fari utilaĵojn agrablajn, mi ĝin ŝatas duoble. Kion vi volas ! ĉiu havas siajn preferojn !

F-ino A Stribick (el Parizo).

« Laŭ mia opinio fraŭlino devas peni por kiel eble plej frue lerni ĉion, kio povos plezuri al sia edzo. Certe ŝi ne eraros klopodante por facile varti infanojn, prepari bongustajn manĝaĵojn. Tiel farante, ŝi ĝuos agrablecon por si, kaj ŝi ĝuigos sian karegan edzon. Jen estas do la agrabla arto ĝuste preferinda!

F-ino Suzanne Devoucoux.

— Ni tre dankas F-ojn Stribick kaj Devoucoux, kiuj sendis al ni tiujn tre interesajn respondojn. La infana skribado de F-ino Devoucoux, sur bela ilustrita poŝtkarto, igas nin juĝi, ke ŝi estas juna knabino. Ĉu ni eraras? Tial, ŝia « opinio » estas des pli interesa! — E. P.

MIRINDA AVENTURO

OKOZINTA AL LA MONUJO DE SINJORO BOULARD.

El « *Lisez-moi çà!* » de PIERRE L'ERMITE,

La fabriko de kandeloj estis ajna : grandaj muroj nigraj kaj malgajaj, longaj aleoj surŝutitaj per skoriaĵoj, kaj difektitaj de ĉaregoj ; dekstre kaj maldekstre tabulaj barakoj malbone ŝirmitaj kontraŭ la pluvo per gudrita teksaĵo kaj rompitaj vitraĵoj ; meze de la korto staris izola konstruaĵeto, iom malluksa ; ĝi estis grize pentrita, kaj sur ĝi estis skribita per dikaj literoj la jena vorto « *Administracio* ».

Tie ni trovas Boulard, meze de lia inventaro, unu jaron ĝuste post la memorinda sceno pli supre rakontita.

La maljuna kanajlo estas nun en granda kolero ; kun sia ronda ĉapo malantaŭe sur la verto, kun okulvitroj sur la nazo, kun vizaĝo tiel ruĝa, ke ĉiuj liaj vejnoj en la haŭto ŝajnas tuj eksplode krevontaj, li nervoze turnadas la paĝojn de l'mendlibro la kasisto staras apud li, kun papertranĉilo en mano, kaj montras tie kaj tie karakterizajn ciferojn.

« Nu, komparu

Decembro 1891. — Granda Edukejo de l'Fratoj.

Oleo.....	2.000 frankoj
Kandeloj	800 frankoj

.,. Kaj nun rigardu la konton de la nuna jaro... » kaj la kasisto turnis plenmanon da paĝoj ;

« Vidu, li diris...

Decembro 1892. — Granda Edukejo de l'Fratoj

Oleo..... 0
Kandeloj 0

— Mil miloj da diabloj !,.. ekĝemis Boulard per raŭka voĉo.

— Kaj ĉie same, plidiris la kasisto ; evidente nekonata mano iel agadis en nia afero, kaj forigis ĉiujn mendojn.

Nu, vidu ankoraŭ

Katedralo de..... — Jaro 1891

Oleo 1.800 fr.
Kandeloj 2.700 fr.

Jaro 1892

Oleo..... 0
Kandeloj..... 0

Kaj ankoraŭ

Kongregacio de monaĥinoj en,.. -- Jaro 1891

Vakso..... 1.100 fr.
Oleo..... 900 fr.
Kandeloj..... 1.500 fr.

Kaj nunjare : nenio,,. kaj, mi rediras, ĉie same. Restas al ni proksimume nur laika klientaro ; nu, ĝi uzas precipe gasan, aŭ petrolan lumon, eĉ en la baloj...

— Kaj kiom malpliiĝis la negocado ?

— 150.000 frankojn... »

Boulard eksaltis kaj viŝis sian frunton.

«... Kaj necese estas plej baldaŭ rebonigi nian afenor, daŭrigis la oficisto, la forlasoj ja pli kaj pli multiĝas : ankoraŭ hodiaŭ matene mi ricevis leteron el la Malgranda Seminario de....., petantan definitivan soldon de ĝia konto ĉe nia firmo.

Ĉu do vi havis malpacon kun altrangaj ekleziaj personoj ?

Ne, ne, tute ne ! nur mia vojaĝisto traktas kun la ekonomoj de la pastraĉaro...

— Ĉu do — kaj la kasisto mallaŭte ekparolis — eble via Moŝto estas framasona ?... Vi scias, ke la nomaroj de la membroj estas nun ĉie publikigataj per afiŝoj !... »

Responde Boulard nur levis la ŝultrojn kaj eliris klakigante ĉiujn pordojn.

Kelkajn momentojn poste, oni estus povinta vidi lin en la kavvojeto, laŭlonge de kiu ĉarme murmuretas la Liepvrette; sed la fabrikisto de kandeloj tute ne estis en humoro por ĝin aŭskulti; li abomeninde ĵuraĉis, disrompante furioze per sia bastono la altajn trunketojn de la herbaĵoj kliniĝantaj sur la rando de l'vojeto.

Ne rimarkinte, li alvenis al la malgranda ponto, ĉe kiu li estis unuafoje renkontinta la pastron, kaj io kvazaŭ subita kompreniĝo tuj eklumis en lia spirito.

« Jen ! mi trovis ! !.., Li estas la kaŭzo de ĉio !... » li ekkriiŝ, frapante al si la frunton, «... evidente ! li estas la sola kaŭzo !!... nenia dubo nun restas !.,. li petis de laboristoj la nomaron de la klientoj, kaj skribis al ĉiuj !... Ha ! kanajlo ! !... Ha ! Loyola ! !..... 150.000 frankojn !... nur tian sumeton ! ! !... » kaj en la silento de l'vespero, Boulard minacis per la pugno al la nevidebla malamiko loĝanta en la malriĉa pastrejo tute purpurigata en la lumo de l'subiranta suno, kaj disĵetis al la mirigitaj eĥoj tiun solan vorton, kiun li povis trovi *Kanajlo* !,,. *kanajlo* ! !.., *kanajlo* ! ! !...

Nune, vi eble supozas, ke Boulard tuj prenos solidan bastonegon, kaj embuske atendos la bonan pastron ĉe angulo de vojo.....

Tion vi supozas; sed en la fabrikisto de kandeloj sin kaŝas framasono « *opportunard* » ; kaj nenio povas esprimi la malesperon, la senkuraĝecon, kiu ekkaptas tiajn homojn, kiam oni trafas ilin *je la poŝo*, ilia sola loko sentema.

Aĥilo estis vundebla nur je l'kalkano; ili estas vundeblaj nur je l'monujo; sed trafi ilin tie, tio estas kvazaŭ sidiĝi sur la pupilon de iliaj okuloj !

Tial, en sia skribocambro, Boulard estas disfalinta sur kanapon, kun la kapo en la manoj en la plej profunda senkuraĝeco. Lia fabriko ĝis nun vivis nur dank'al la klerika klientaro, *la pastraĉaro*, kiel li ĝin nomas, kaj nun ĝi forlasas lin !... Kion nun fari ?... Ĉu rekomenci ĉion, trovi novajn aĉetantojn, krei novan klientaron ?

.,. Tiel aĝa, kiel li estas, li jam ne povas tion fari ; oni ne rekomencas en sia kvindeka jaro kion oni faris en la dudekkvina !...

Kaj tamen nur tiu pastro... tiu naŭcent-franka pastro kaŭzis tion.,.. 150.000 frankoj forflugitaj !.,. Ha ! Loyola ! !...

Kaj en tiu mallarĝa spirito la simpla vilaĝa pastro, tiel plene dispremita, se li estus nur bona, aperis kun ia kvazaŭa nimbo, ĉar li estas pli forta ol supozis Boulard, ĉar li povas ankoraŭ redoni baton kontraŭ bato, ĉar necese estas ne malŝate lin malatenti.

En tiu momento la malgranda sonorilo de la preĝejo malproksime eksonoris anoncanta por la posta tago feston de la Virgulino. Boulard, obstine rigardante al la planko neatente aŭskultadis,..

Subite ideo traflugis lian kapon

« Marnjo, por kio oni sonorigas en la preĝejo ?

— Ĉu mi scias, mi !

— Donu al mi la kalendaron. »

La servistino, neniel komprenante, alportas la almanakon ; Boulard kelkajn momentojn traserĉas, kaj fine haltigas la fingron sur la morgaŭa dato...

« 8ª de Septembro... *N. de la Sankta Virgulino*, « *N.* »... tio signifas « *Naskiĝo*, ĉu ne, Marnjo ?...

« Ĉu mi scias ! rediris la servistino, tute skandalita.

— Kiel ! vi ne scias tion ! vi !... Ne ankoraŭ forpasis ok jaroj, de kiam vi plenumis vian Unuan Komuniiĝon !.,, Vi do nenion f...uŝadis en la katekismo ?...

Reveninte en la kuirejon, Marnjo rakontis al la spicistino ke Boulard subitege freneziĝas ; tion konfidenciis la spicistino al la karbisto, kiu ĝin rediris al la edżino de l'adjunkto. La postan tagon ne estis unu domo, en kiu ne estis konata la novaĵo.

Ĉiuj virinoj estas scivolaj ,escepte vi Sinjorino aŭ Fraŭlino kiu legas tiujn ĉi liniojn. Tio komprenigas, kial Marnjo, je la dek-unua nokte, ne ankoraŭ dormis ; ŝia malgranda cerbo laboreganta ne lasis al ŝi la eblon fermi unu el ŝiaj okuloj... Kial la mastro diris tion ĉi ?... Kial li faris tion ?.... Kial li sendis ŝin

aĉeti dek du metrojn da bluaj silkrubandoj ?.,. Kial li ordonis alporti en sian ĉambron kestojn da luksaj kandeloj destinitaj nur al piano aŭ salona lustro ?.. Ĉio ĉi maltrankviligis la junulineton, ĉar vere la afero estis tute ne klara.

Kaj, por igi ankoraŭ pli granda ŝian malkomprenon, jen ŝi ekvidis de sia lito la fenestron de Boulard brile lumigatan, kaj sur la kurtenoj, kvazaŭ sur ombra teatro, gigantan silueton projekciiĝantan en formoj strangegaj.

Tuj Marnjo iris veki Catu la kuiristinon, kiu komisiis sian edzon, eks-limdepagiston, por klarigi la aferon.

Senbrue, sur la pinto de l'piedoj, por ke ne grincu la ŝtonetoj sur l'aleo, la maljuna edzo de la kuiristino almetis ŝtuparon kontraŭ la muron tute kovritan de spaliroj ; poste li grimpis sur ĝi nur sufiĉe por atingi la fenestron, kaj tiam spione ekrigardis en la ĉambron de l'mastro.

Boulard kalsonvestita, kaskita per altega noktoĉapo, estis volvefaldinta siajn ĉemizajn manikojn ĉirkaŭ siaj brakoj tuberplenaj kvazaŭ maljuna vinbertrunko de l'tempo de Melchisedech. Firme tenataj inter liaj fingroj, kiujn ili similigis al kolbasoj de Lyon, la bluaj silkrubandoj metode glitadis, ĉirkaŭligantaj triope la kandelojn. Poste Boulard envolvis ilin en delikata papero, kaj ilin aranĝis arte en eleganta skatolo. Li ŝajnis perfekte kvieta kaj trankvila.

« Pli bona certe estas tio ol furioza frenezeco, » rimarke diris Marnjo al Catu dum ŝi reportis la ŝtuparon en la remizon.

— Ĉu frenezeco ? Mi ne scias... » murmuris la maljuna kuiristino, kiu havis pli grandan sperton.

Sed nenio povus esprimi la surprizegon, la miregon de Marnjo, kiam, la postan tagon, frumatene, Boulard, ordoninte, ke ŝi vestiĝu per dimanĉaj vestaĵoj, metis al ŝi sur la brakojn elegantan skatoleton de kandeloj, dirante

« Iru tuj en la pastrodomon, ĉe la paroĥestron ; prezentu vin dece, sen viaj iamaj malbelaj manieroj, kaj diru al li « Via Pastra Moŝto, Sinjoro Boulard, via paroĥano, sendas al vi tiun skatolon da kandeloj por la festo de la bona Virgulino ; li alportos *mem* al vi pli bonajn ankoraŭ por la Perpetua Adorado... «

Tamen iu estis, kiu ankoraŭ pli surpriziĝis ol Marnjo, nome... la pastro !...

Kun permeso de l'aŭtoro traduk is P. C.

LA LASTA ABENCERAĜO

DE CHATEAUBRIAND (*Sekvo*)

— Se ci ne plenigis mian animon per feliĉegoj, diris li al Blanka, kun kia ĉagreno mi estus devigata peti de ci, hispanino, la historion de tiuj hejmoj ! Ho ! tiuj lokoj estas faritaj por esti tiel kaŝita ejo de feliĉeco ; kaj mi... !

Aben-Hamet ekvidis la nomon de Boabdil' enkadrigitan per mozaikaj ŝtonetoj..

— Ho mia reĝo, li ekkriis, kio fariĝis pri vi ?

Kie mi vin trovos en via Alhambra'o dezerta ?

Kaj la larmaj de l'fideleco, de l'lojaleco kaj honoro plenigis la okulojn de l'juna Maŭro.

— Viaj antikvaj estroj, diris Blanka, aŭ plivole la reĝoj de viaj patroj estis nedankemaj.

— Estas ne grave ! respondis l'Abenceraĝo : ili estis malfeliĉaj !

Kiam li elparolis tiujn vortojn, Blanka alkondukis lin en lokon, kiu ŝajnis esti la sanktejo mem de l'templo de l'Amo.

Nenion egalis la elegantecon de tiu ripozejo ; la tuta arkaĵo azure kaj ore pentrita, farita el detranĉitaj arabaĵoj, lasis la lumon trapasi, kiel tra flora teksaĵo. Fontano ŝprucis meze de l'monumento, kaj ĝiaj akvoj refalantaj kiel roso estis kolektitaj en alabastra konko.

— « Aben-Hamet, diris la filino de l'duko de Santa-Fe, atente rigardu tiun fontanon ĝi ricevis la difektitajn kapojn de l'Abenceraĝoj. Vi ankoraŭ vidas sur la marmoro sangan makulon de l'malfeliĉuloj, kiujn Boabdil' oferis pro siaj suspektoj. Tiele oni agas, en via lando, kontraŭ la homoj, kiuj delogas kredemajn virinojn. »

Aben-Hamet plu ne aŭskultis Blankan li genufleksis, kaj respekte kisis la sangan postsignon de siaj prapatroj. Li releviĝas kaj ekkrias

— Ho Blanka, mi juras per la sango de tiuj kavaliroj ke im cin amos kun la ĉiameco, la fideleco kaj fervoro de Abenceraĝo.

— Ĉu do vi min amas? diris Blanka kunigante siajn du belajn manojn, kaj levante siajn rigardojn al la ĉielo. Sed ĉu vi pripensas ke vi estas nekristano, maŭro, malamiko; kaj ke mi estas kristanino kaj Hispanino?

— Ho! profeto Sankta! diris Aben-Hamet estu atestanto pri miaj juroj!....

Blanka interrompante lin

Kiun fidon mi povas montri pri juroj de persekutanto de mia Dio? Ĉu vi scias se mi vin amas? Kio donis al vi la trobravecon tiele al mi paroli? Aben-Hamet, konsternata, respondis

— Estas vere ke mi estas nur cia sklavo, ci ne elektis min kiel cia kavaliro.

— Maŭro, diras Blanka, forlasu la ruzon; ci vidis en miaj rigardoj ke mi cin amas; mia freneza pasio al ci estas senmezura: estu kristano, kaj nenio malhelpos ke mi estu tute al ci. Sed se la filino de l'duko de Santa-Fe kuraĝas tiel malkaŝe al ci paroli, ci povas juĝi pro tio, ke ŝi scios sin venki, kaj neniam malamiko de kristanoj havos sur ŝi rajton ian. Aben-Hamet en pasia fervoro ekkaptis la manojn de Blanka, metis ilin sur sian turbanon kaj poste sur sian koron. Allah'o estas potenca, ekkriis li, kaj Aben-Hamet estas feliĉa! Ho Mahomet'o faru ke tiu kristanino konu cian leĝon kaj nenio povos.....

— Ci blasfemas, diris Blanka, ni eliru el tie ĉi.

Ŝi apogis sin sur la brakon de l'Maŭro, kaj alproksimiĝis al la fontano de l'Dekdu Leonoj, kies nomo estas donita al unu el la kortoj de l'Alhambra'

— Fremdulo, diris la naiva hispanino, kiam mi rigardas cian robon, turbanon, armilojn, kaj kiam mi sonĝas pri nia amo, mi kredas vidi la fantomon de la bela Abenceraĝo, promenantan en tiu forlasita ejo kun la kompatinda Alfaïma.

Klarigu al mi la araban surskribon gravuritan sur la marmoro de tiu ĉi fontano. Aben-Hamet legis la vortojn

La bela princino, kiu promenas kovrita per perloj en sia ĝardeno, tiel mirege pligrandigas la belecon de ĝi.....

La resto de l'surskribo estis nelegebla.

« Estas por ci ke tiu enskribo estis farita, diris Aben-Hamet. Amata sultanino, tiuj palacoj neniam tiel belaj estis en sia juneco kiel ili estas nun en siaj ruinoj. Aŭskultu la bruon de l'fontanoj, kies musko ŝanĝis la kuron de l'akvoj; vidu la ĝardenojn, kiuj ekvidiĝas tra tiuj arkadoj duone falitaj; admiru la astron de l'tago, kiu kuŝiĝas trans tiuj arkaĵaroj: kiel dolĉe estas vagadi kun ci en tiuj lokoj! Ciaj paroloj balzamumas tiujn ejojn, kiel edziĝaj rozoj. Kun kia ĉarmo mi rekonas en cia lingvaĵo kelkajn akcentojn de la lingvo de miaj prapatroj! Nur ekbrueto de cia robo sur tiuj marmoroj igas min ektremeti. La aero estas parfumita nur tial ke ĝi tuŝis cian hararon. Ci estas bela kiel la genio de mia patrujo meze de tiuj ruinoj. Sed, ĉu Aben-Hamet povas esperi ke li posedas cian koron? Kiu li estas kompare al ci? Li trairis la montojn kun sia patro; li konas la kreskaĵojn de l'dezerto..... Ho ve! Ne ekzistas unu, kiu povas resanigi en li la vundon, kiun ci faris al li! Li portas armilojn, sed li ne estas kavaliro. Jam mi diris al mi L'akvo mara kiu dormas ŝirmita en kaveto de ŝtonego, estas trankvila kaj muta, dum proksime la granda maro estas moveganta kaj bruanta. Aben-Hamet, tia estos cia vivo, silenta, trankvila, nesciata en angulo de nekonata lando, dum la kortego de l'sultano estas malkvietigita de l'ventegoj. Mi diris tion al mi, juna kristanino. kaj et pruvis al mi, ke la ventego ankaŭ povas maltrankviligi la guton da akvo en la kaveto de l'ŝtonego, »

Rave Blanka aŭskultis tiun lingvaĵon, por ŝi tute novan, kies orienta dirmaniero tiel bone taŭgis en tiu feina palaco, kiun ŝi trairis kun sia amato.

La amo tute penetris sian koron; ŝi sentis ke ŝanceliĝis siaj genuoj; ŝi devis apogi sin pli forte sur la brakon de sia gvidanto. Aben-Hamet subtenis la dolĉan ŝarĝeton kaj rediris paŝadante:

« Ho! kial ne estas mi altranga Abenceraĝo!

— Ci malpli plaĉus al mi, diris Blanka, ĉar mi estus pli maltrankvila; restu humila kaj vivu por mi. Ofte fama kavaliro forgesas la amon por serĉi la famon.

— Tia danĝero ne ekzistus por ci, rapide rediris Aben-Hamet.

— Kaj kiel do ci amus min, se ci estus Abenceraĝo? diris la idino de Khimeno.

Mi amus cin, respondis la Maŭro, pli ol la gloro kaj malpli ol la honoro. »

La suno estis malaperinta sub la horizonto dum la promenado de la geamantoj. Ili estis tute trairintaj l'Alhambra'on. Kiaj memoroj por la pensado de Aben-Hamet ? Tie ĉi, la sultanino ricevis per fenestretoj la funion de l'parfumoj, kiujn oni bruligis malsupre. Tie, en tiu kaŝata ripozejo, ŝi vestiĝis per ĉiuj orientaj ornamaĵoj.

Kaj estis Blanka, estis amegata virino, kiu rakontis tiujn detalojn al la bela junulo kiun ŝi amegis.

La luno leviĝante disĵetis ĝian palan lumon sur la forlasitajn sanktejojn, kaj en la dezertajn vestiblojn de l'Alhambra'o.

Ĝiaj blankaj radioj desegnis sur la herbejoj de l'bedoj, sur la muroj de l'ĉambregoj, la punton de aera arkitekturo, la arkaĵojn de l'arkadoj, la movantan ombron de l'ŝprucantaj akvoj kaj de l'arbetoj svingitaj de dolĉa venteto.

La najtingalo kantadis en cipreso, kiu trapasis la kupolojn de ruina moskeo kaj la eĥoj rediris ĝiajn plendojn. Sub la luna lumo, Aben-Hamet skribis la nomon de Blanka sur la marmoro de l'ĉambrego: « La Du Fratinoj. » Li skribis tiun nomon en arabaj literoj, por ke la vojaĝanto havu unu plian misteron por diveni en tiu palaco de l'misteroj.

« Maŭro, tiuj lokoj estas kruelaj, diras Blanka, ni forlasu ilin. La sorto de mia vivo estas eterne fiksita. Bone memoru tiujn vortojn Mahometano, mi estas cia amantino sen espero; kristano, mi estas cia feliĉa edzino. »

Aben-Hamet respondis

« Kristanino, mi estas cia malfeliĉa sklavo; Mahometanimo, mi estas cia glora edzo ». Kaj la noblaj geamantoj eliris el tiu danĝera palaco.

La pasio de Blanka tago post tago pligrandiĝis, kaj tiu de Aben-Hamet kreskadis kun sama fervorego. Ĉar li estis nur por si mem amata, ĉar li ŝuldis al nenia alia kaŭzo la sentojn, kiujn li inspiris, li estis pro tio tiel ĉarmita, ke li kaŝis la sekreton de sia naskiĝo al la filino de l'duko de Santa-Fe : li deziris ĝui la delikatan plezuron sciigi al ŝi ke li havas faman nomon, en la tago mem kiam ŝi konsentos doni al si ŝian manon por edziniĝo.

Sed li subite estis alvokita al Tunis'; lia patrino atingita de malsano neresanigebla, deziris kisi sian filon kaj lin beni antaŭ ol forlasi la teron. Aben-Hamet prezentas sin al la palaco de Blanka.

— Sultanino, diris li, mia patrino baldaŭ mortos. Ŝi petas min por fermi al ŝi la okulojn. Ĉu ci konservos al mi cian amon ?

— Ci min lasas, respondis Blanka paliĝante, Ĉu mi cin iam revidos ?

— Venu, diris Aben-Hamet, mi volas postuli de ci ĵuron ian, kaj fari al ci alian, kiun nur la morto povos rompi. Sekvu min. »

Ili eliras ili alvenas ĉe tombejo, kiu estis iam tiu de l'Maŭroj. Oni vidis ankoraŭ tie ĉi kaj tie funebrajn kolonetojn, ĉirkaŭ kiuj la skulptisto iam desegnis turbanon; sed la kristanoj poste anstataŭis tiun turbanon per kruco. Aben-Hamet alkondukis Blankan apud tiuj kolonetoj.

— Blanka, diris li, tie ĉi ripozas miaj praavoj; mi ĵuras pro iliaj cindroj cin ami ĝis la tago, kiam l'Anĝelo juĝonta min elvokos al la juĝejo de Allah'. Mi promesas al ci neniam donaci mian koron al alia virino, kaj edziĝi tuj kiam ci konos la Sanktan lumon de l'Profeto. Ĉiujare, je tiu ĉi epoko, mi revenos Grenadon por certiĝi ĉu ci estas fidela al mi, kaj ĉu ci volas forlasi ciajn erarojn.

— Kaj mi, diris Blanka plorante, mi cin atendos ĉiujn jarojn; mi konservos al ci, ĝis mia lasta sopiro, la amon kiun mi ĵuris al ci, kaj mi ricevos cin, kiel edzo, kiam la Dio de l'kristanoj, pli potenca ol cia amantino, estos venkinta cian nekristanan koron.

Aben-Hamet foriras; la ventoj forportas lin al Afrikaj randoj; lia patrino estis ĵus mortinta. Li ŝin ploras, li kisas ŝian ĉerkon. La monatoj pasiĝas jen vagante inter la ruinoj de Kartago, jen sidante sur la tombo de Sankta Ludoviko, l'Abenceraĝo ekzilita deziregas la tagon en kiu li devos reiri Grenad'on.

Lumiĝas fine tiu ĉi tago, Aben-Hamet supreniras ŝipon kaj direktigas ĝin al Malaga'. Kun kia entuziasmo, kun kia ĝojo miksita kun timo li ekvidis la unuajn promontorojn de Hispanujo !

Ĉu Blanka atendas lin sur tiuj randoj?

Ĉu ŝi ankoraŭ memoras kompatindan Arabon, kiu ne ĉesis adori ŝin sub la palmarbo de l'dezerto?

La filino de l'duko de Santa-Fe ne estis malfidela pri siaj ĵuroj. Ŝi petis sian patron ke li ŝin konduku al Malaga'. El supre la montoj kiuj ĉirkaŭas la dezertan bordon, ŝi sekvis per rigardoj la malproksimajn ŝipojn kaj la forflugantajn velojn.

Dum la ventego, ŝi timege rigardadis la maron, sublevitan de la ventoj : tiam ŝi revadis rigardante la nubojn, ŝi imagis ke ŝi estis en la danĝeraj lokoj, ke ŝi estis banita per la samaj ondoj, envolvita de l'sama ventoturniĝo, kiuj minacis la vivon de Aben-Hamet

Kiam ŝi vidis la ĝemetantan mevon tuŝeti la ondojn kun ĝiaj grandaj kurbitaj flugiloj kaj forflugi al l'Afrikaj bordoj, ŝi metis en ĝi ĉiujn amemajn vortojn, ĉiujn frenezulajn bondezirojn, kiuj eliras el koro konsumita de pasio.

Iam, vagadante sur la marbordo, ŝi ekvidis longan ŝipeton, kies alta antaŭaĵo, klinita masto, kaj latina velo anoncis la elegantan genion de l'Maŭroj.

Blanka rapidas al la haveno, kaj baldaŭ vidas eniri la barbaran ŝipon, kiu ŝaŭmigis la ondon sub la rapideco de ĝia kuro. Maŭro, vestita per belegaj vestoj, staris sur l'antaŭaĵo.

(*Sekvo venos*).

Tradukis : ELEDA KAJ VINKO.

PAĜO DE L'DIREKTORO

Dum la Kongreso. Mi petas la legantojn, ke ili bonvolu ne skribi al mi aŭ sendi manuskriptojn, de la 27-a de aŭg. ĝis la 6-a de septembro, tial ke mi ĉeestos la Kongreson. Tiuj, kiuj nepre bezonos skribi estas petataj sendi la leterojn ĉe la *Kongresa Oficejo, 15. Quai de l'Ile. Genevo.*

Kunvenoj de Katolikaj Esperantistoj espereble fariĝos dum la Kongreso. Ni ne povas nun doni certajn informojn pri tio. Afiŝoj aŭ cirkuleroj tion konigos ĝustatempe.

Preĝaro por katolikoj. Dank'al la malavareco de abonanto, kiu subskribis 50 ekzemplerojn, ni povas anonci ke la preĝaro

certe presiĝos post la Kongreso. Ni ricevos la subskribojn ĝis *la deka de septembro* (3 fr. por ricevi la tri kajerojn ; la unua kajero aperos en oktobro kaj enhavos la plej utilajn kaj precipajn preĝojn). *Post tiu epoko la prezo de* l'Preĝaro *estos plialtigata.*

Loĝado en Franclando. La Direktoro de E. K. plezure donos informojn pri loĝado al la vojaĝantoj, kiuj trapasas Tours (Tur'), aŭ al la nefrancoj, kiuj deziras pasigi tempon en Franclando por lerni la lingvon. La Direktoro mem povas loĝi unu aŭ du lernantojn. Li rekomendos ĉarman familion al la virinoj kaj junulinoj. Oni scias, ke la « Tureno » (provinco de Tur'), estas la loko de Francujo en kiu oni plej bele kaj ĝuste elparolas la francan lingvon.

Al S-o J.T. (Fixem). Ŝajnas ke en la frazo aludita ĉiu el la du vortoj estas konvena. Eble ja la vorto « rabisto » estus pli ĝusta.

Al S-o F. G. R. (Nottingham). La muziko de l'*Laudkanto* (de P-o Rust, estas bela, kaj la vortoj decas ja por ĉiuj kristanoj. Bedaŭrinde, mi ne povas ĝin presigi en E. K.

Al S-o J.W. (Loveno). Tre bela estas via « Senmakula ». Sed tiel, kiel por la muziko de S-o R, mi ne povas ĝin publikigi en E. K Tamen mi esperas, ke ni povos ĝin kantigi per du voĉoj en Genevo.

Por iri Genevon, La vojaĝa agento « CASIER », 83 Boulevard Anspach, Bruxelles (Belg.) proponas jenajn kondiĉojn:

1-a kategorio : foriro el Parizo la 27 aŭg. matene, ĉeestado en Genevo la 28, 29, 30, 31 aŭg. kaj 1 sept. ; loĝado en la hotelo kun tri manĝadoj, foriro el Genevo la 2 sep. (matenmanĝo, veturilo al la stacidomo) Prezo por unu persono (hotelo unuaklasa) laŭ vojaĝo en 1-a, 2-a, 3-a klaso: 235 fr.. 195 fr., aŭ 170 fr. (Hotelo duaklasa: 25 fr. malplie).

Se oni foriros el Parizo la 27-an nur *vespere*, la prezo estos 6 fr. malplie.

2-a kategorio foriro el Parizo je la sama dato, sed kun la

vojaĝo al Montreux, Interlaken, Murren, kaj reveno tra Interlaken, Berne al Genevo, por foriri el Genevo la 6-an sep. matene. Prezo (hotelo unuaklasa) laŭ vojaĝo en 1-a, 2-a, 3-a klaso: 365 f.,, 280 fr. 255 fr., (kun hotelo duaklasa: malplie).

La « Voyages Casier » donos informojn al la petantoj pri la foriro el aliaj urboj.

EN ESPERANTUJO

(**Pro troa materialo ni devis forlasi la rubrikon.** *Revuo de la Revuoj Esperantistaj.* **Sed ĝi reaperos en la oktobra numero ĉar ĝi estas tre ŝatata de niaj legantoj.** — *La Direktoro.*)

PRI LA LITEROJ SUPERSIGNITAJ

Kun intereso mi legis en E. K. la publikan leteron de ghia Direktoro pri la literoj supersignitaj. Lia presisto, li diras, « ne volas acheti linotipon kun supersignitaj literoj tial, ke 1e li ne presas sufiche da Esperanto por okupi unu linotipon ; 2e linotipo kun supersignitaj literoj estus tre maloportuna kaj ghena por komposti nacian lingvon. »

Shajnas al mi, ke la unua motivo estas nur konsekvenco de la dua, kiu restas do sole konsiderinda. Se efektive estas facile komposti nacian lingvon per linotipo posedanta supersignitajn literojn, tute ne bezone estas okupi ghin nur per esperanta kompostado.

La demando restas do nur la jena « Chu vere estas maloportune komposti nacian lingvon per linotipo kun supersignitaj literoj ? »

Ne per teoria argumentado mi respondos, char ni posedas pri tio praktikan ekzemplon chiutage kontroleblan Preskau chiuj verkoj elirantaj el la Esperantista Presejo estas kompostitaj per « esperanta » linotipo, kiu estas uzata ankau *sen ia malfacileco* por komposti nacilingvajn tekstojn.

La motivoj pretekstitaj de la presisto de E. K. shajnas do iom senvaloraj, sed ni devas konsideri nur tiun chi fakton, ke li *ne volas* — pro ia ajn motivo — acheti esperantan linotipon. Li do devos uzi specialan alfabeton, kiam li volos presi Esperanton.

Nun, ni ekzamenu, kian alfabeton li devos uzi. Sed, antaue, ni rimarku, ke uzo de tia alfabeto povas esti nur *escepta* : ghi povas taugi, ekzemple, por doni, okaze, specimenon de Esperanto en gazeto, kies presisto ne posedas su-

persignitajn literojn ; sed mi kredas ghin tute forjhetinda por *Esperanta* gazeto ; ghi estus baldau forlasita de chiuj siaj abonantoj, se ghi ne uzus la « veran » alfabeton de Esperanto.

Por la esceptaj okazoj jhus aluditaj, Doktoro Zamenhof difinis mem en sia « Fundamento de Esperanto » specialan sistemon mirinde simplan kaj regulan. En tiu libro *leghdona por chiuj Esperantistoj* — ech por la membroj de la Lingva komitato — li permesas anstataui la supersignojn per la litero *h* almetita post la literoj, kiuj devus esti supersignitaj, kaj ne zorgi pri la speciala supersigno de la litero *u*.

Kontrau tiu sistemo tiel simpla — *deviga* por chiuj Esperantistoj, kiuj ne povas uzi la veran alfabeton — kion oni diras ?

— « ghi ne estas « *akceptebla* » tial ke ghi kontraudiras fundamentan leghon de Esperanto unu litero por unu sono. »

Chu la vorto « akceptebla » ne shajnas iom stranga, kiam oni memoras tiun chi frazon de Doktoro Zamenhof pri la *Fundamento de Esperanto* : « **Chio**, kio trovighas en tiu chi libro, devas esti rigardata kiel **deviga por chiuj.** » ?

Kaj, ekster tiu principa demando, chu vere tia uzo de la litero *h* donas al ghi *novan sonon ?*

Chu ne shajnas evidente al chiuj Esperantistoj, ke, en tia okazo, la litero *h* ne havas plu valoron de *litero* sed de *signo* montranta, ke mankas supersigno sur la antaua litero ? Chu oni ne tuj rekonas en penso la veran vorton sub tiu escepta formo ?

(Cetere chu tiu principo « unu litero por unu sono » — kiu nenie estas *esprimita* en la Fundamento — estas vere tiel absoluta ?... Pri tio ekzamenu zorge la sonon de la literoj *o* kaj *a*, ekzemple en la vortoj « bon*a*n p*a*non », kaj konparu la longan sonon de vokalo akcentita kun tiu mallonga de la sama vokalo neakcentita.)

Chio dirita kontrau la Zamenhofa sistemo shajnas do vere ne tre grandvalora. Sed anstatau ghi, kion oni do proponas al ni ?

Unue : *forigon* de la ordinara litero *h* ;

Due *enkondukon* de *nova litero y*, kiu havos la sonon de *j* ;

Trie *enkondukon* de apostrofo, kiu havos la sonon de la forigita litero *h* ;

Kvare *transdonon* al *j* de la sono de la litero *j* supersignita,

Por *c*, *g*, *s*, *u* supersignitaj, oni « *akceptas* » la Zamenhofan regulon, sed ne por *h* kun supersigno, por kiu oni proponas *kh*.

Kaj, *praktike*, pro kio oni trovas *neakceptebla* regulon *devigan* de la Fundamento ?

Nur tial, ke ekzistas kelkaj maloftaj vortoj kiel *chashundo*, *chashoro*, kiujn oni eble povus legi *cha-shundo*, *cha-shoro*, tute same kiel la vortoj *kolego*, *piediranto*, *diamanto*, ktp., estas legeblaj *kol-ego*, *pie-diranto*, *diamanto* !...

Cetere mi rimarkigas, ke, por tiaj vortoj, estus tre facile forigi chian malfacilecon per simpla uzo de streketo *chashundo*, *chas-horo* ; kaj mi proponas al la legantoj komparon inter la du sekvantaj frazoj skribitaj lau la du sistemoj.

Proponita sistemo « La *chas'undoy*, sen'alte serchinte dum multay *chas'oroy* la mal'elan best'eymon de tiuy nigr'autay kay mult'aray bestoy, fine trovis ghin sen'elpe en regiono tute sen'oma. »

Zamenhofa sistemo « *La chas-hundoj*, senhalte serchinte dum multaj *chas-horoj* la malhelan besthejmon de tiuj nigrhautaj kaj multharaj bestoj, fine trovis ghin senhelpe en regiono tute senhoma. »

Kiu el la ambau frazoj estas pli facile legebla kaj pli konservis la esperantan shajnon ?

Kaj chu oni trovis ech unu nekompreneblan vorton en tiu chi artikolo, tute skribita lau la Zamenhofa sistemo ?

Kion do mi konkludos ? (Ne legu : *Konk-ludos* !)

Se mi povus proponi konsilon al la Direktoro de E. K. mi dirus :

per alfabeto alia ol la *vera* Esperanta alfabeto.

« Nepre evitu publikigon de perioda Esperantista gazeto per alfabeto alia ol la *vera* Esperantata alfabeto.

Se tamen vi ne timas perdi viajn abonantojn, uzu la Zamenhofan sistemon, char

1e Ghi shajnas al mi tute bona ;

2e Nur per praktika uzo vi povos montri, chu ghi estas vere « neakceptebla ».

3e Vi povas *jam nun* ghin uzi, ne atendante respondon de la Lingva Komitato.

TEDULO.

(*Kompostita per linotipo.*)

NOTO. — Ni ricevis multe da leteroj, pro nia artikolo pri la literoj supersignitaj. Ni intencis unue ilin analizi kaj denove pritrakti la demandon. Ni ne havis sufiĉe da tempo por tio. Ni tamen tre dankas la amikojn, kiuj skribis al ni, kaj ili povas esti certaj, ke iliaj konsiloj ne estos senutilaj. — Ni ja estas iom pli embarasataj ol antaŭe pro la diverseco de la opinioj kaj avizoj ricevitaj !... (Em. P.).

RONDIRANTAJ GAZETOJ

ALVOKO AL KATOLIKAJ PASTROJ KAJ RELIGIULOJ

En la *Belga Sonorilo* de Februaro 1905 la jenaj vortoj (de S. Hodler) estis legeblaj

« La tuja uzado de Esperanto estas plej grava por la estonta disvastiĝebleco de nia afero. Nia lingvo staras nuntempe sufiĉe konata por ke la esperantistoj povu ricevi el ĝi profitan kaj propran utilon. Ni havas mirindan interkomunikilan kaj ĉiopovan helpilon de l'internaciaj rilatoj ; ni sciu ĝin uzi tio estos la plej grava argumento kontraŭ la skeptikuloj kaj malfervoruloj. Inter la jamaj utiloj havigeblaj per Esperanto, unu el la plej interesaj kaj originalaj, estas la kreo de *rondirantoj*, manuskriptaj *gazetoj* inter diversnacianoj.

Rondiranta gazeto estas revuo, kie ĉiuj kunlaboradas ; ĝi estas pli interesa ol privata korespondado aŭ pli vere ĝi estas plivastigita korespondado pri certa celo.

Al ĉiu partoprenanto, Rondirantaj gazetoj havigas akiron de vere internacia esperanta stilo, personan profiton pri la intereso de la laboroj, amikan interrelatiĝon kun alilandaj samideanoj, alie ne konataj.

En la nuna tempo, ĉia profesio, scienco aŭ okupaĵo povas havi inter siaj samprofesianoj rondirantan gazeton, kiu sciigos ilin pri ĉio okazanta en la mondo, kiu ebligos al ili fruktodonan interŝanĝon de penoj kaj ideoj.

La nombro de tiuj gazetoj en l'esperantistaro estas do pliiginda ».

Mi deziras altiri vian atenton pri nova organizaĵo, nome « Pastra Stelaro » fondita jam de kelka tempo kaj plivastigota laŭ jusa decido.

Jen ĝia organizeco la tuta rondo konsistas el sekcioj, « Steloj Pastraj », kies nombro estas senlima. Ĉiu sekcio havas 10 anojn diversnaciajn kaj inter ili manuskripta gazeto ĉiumonate rondiras.

Oni povas interkorespondadi pri ĉiaj temoj, prefere tamen religiaj ĉar nur katolikaj pastroj aŭ religiuloj povas partopreni. Tiu rondiranto estas tre taŭga por formi la terminaron katoli-

kan, ĝis nun ne tre perfektan. Kial ankau ne konigi reciproke la rimedojn por gajni la animojn al J.-K°, uzatajn en sia lando? Kial ne interparoli pri la stato de sia patrujo ĉe l'vidpunkto religia? Oni povas ankaŭ traduki verkojn apologiajn aŭ piajn, priparoli la novajn verkojn religiajn kiuj publikiĝas en sia lando k. c..., k. c...

Inter la nunaj partoprenantoj estas eĉ unu nova esperantisto: ĉar kvankam la rondiranto neniel estas nur por eklernantoj, ĝi tamen ilin kore akceptas; ĉar kelkafoje ili povus sendi interesajn artikolojn al ia ĵurnalo, ekzemple al E. K., kaj ili ne kuraĝas timante pro la nekorekteco de siaj verketoj. Per la rondiranto ili povos samtempe plibonigi sian stilon kaj korektigi siajn artikolojn.

La entrepreno estas granda kaj utila; por ĝin progresigi ni bezonas aniĝojn kaj bonvolojn. Kiu deziras uzi Esperanton, interdisputi kun alilandanoj k. c., tiu *aliĝu tute senpage* al « Pastra Stelaro » kaj *diskonigu* ĝian celon.

— Por ĉiuj sciigoj, informpetoj, aniĝoj, kreo de novaj sekcioj k. c..., k. c..., oni sin turnu al.

Sinjoro rondestro de « Pastra Stelaro »
Chez Monsieur l'abbé Honinckx,
Rd curé (paroĥestro).
Laplante-lez-Namur.
((Belgujo).

N. B. — Tial ke la pastroj estas ofte tre okupataj, ĉio estas tiele aranĝita ke la partopreno postulas nur unu aŭ du horojn liberajn ĉiumonate.

NOTETOJ

Esperantista Centra Oficejo sendis al ni dokumentojn interesajn kaj gravajn, france redaktitajn, pri la 1-a Kongreso de Esperanto en Boulogne. En tri kajeretoj oni kolektis artikolojn de francaj ĵurnaloj pri la Kongreso: el *L'Echo de Paris*, *La Dépêche Coloniale*, *Le Journal*, *La Liberté*, *Le Gaulois*, *Le*

Figaro, *Le Journal des Dèbats*, *L'Humanitè*. Konservindaj dokumentoj por la historio de Esperanto.

Malta letteraria (februara) revuo publikigita en Malto, enhavas artikolon rimarkindan pri Esperanto, verkitan de S-o A. Levanzin, B. A., C. F., P. L., Prezidanto de la Federo Malta « Stelo », unua profesoro de Esperanto en la liceo. Ni ricevis ankaŭ de niaj amikoj Maltaj broŝuron, kiu enhavas diversajn paroladojn faritajn de SS-oj Levanzin, T. Gouder, deputato, kaj D-ro G. Busuttil, nia kunlaboranto. Tiuj paroladoj okazis ĉe festo Esperantista, kie oni kantis, diris poeziojn, kaj ludis diversajn muzikaĵojn. Ni tre esperas vidi kelkajn el tiuj fervoraj pioniroj ĉe la Kongreso Ĝeneva.

Weltwarte (aprila), germana revuo, eldonita en Leipzig, bele ilustrita, enhavas longan kaj detalan artikolon pri Esperanto kaj ĝia strukturo.

H. Cittadino Italiano eldonas sur la unua paĝo de ĝia kovrilo grandan anoncon pri Esperanto kaj pri *Espero Katolika*. S-o Jakobo Meazzini, nia amiko kaj kunlaboranto, redakcias kronikon Esperantan en tiu ĉi revuo. En la junia numero oni legas interesajn informojn pri la propagando en Ameriko kaj en Sicilio. — Prelato Luigi Giambene, kiu fondis la grupon Roman *Imperiosa Civitas*, ĉiam fervore bataladas por Esperanto en Romo. Lia *Vocabolario Italiano Esperanto* estos granda helpo al la Italaj Esperantistoj.

Somnium theologi (D-ro Humanus), estas broŝuro latin redaktita, eltirita el gazeto *Renaissance* (N-o 6, 1906). Sprita kaj lerta kritiko de l'verko de R. P. Hilgers, S. J. pri la defendo de l'*Indekso*, romana tribunalo katolika, kiu *indikas* al la katolikoj la malbonajn librojn, kiujn ili ne devas legi. — Teologiisto dormante sonĝas, ke li diskutadas pri la dika verko (638 paĝoj !... por 9 germanaj markoj !...) kun la sankta patrino Eklezio. Tre leginda de pastroj.

Good Templars kaj Esperanto. Tiu ĉi Angla asocio dissendas broŝuron, kies duono estas dediĉita al Esperanto. Tiu societo estas internacia kaj ĝia estro estas S-o Edward Wavrinski,

M. P., kiu loĝas en Stockholm. Ĉiuj internaciaj societoj iom post iom venas al Esperanto. Kiam ? post kiom da jaroj ni vidos Katolikajn Kongresojn Internaciajn en Esperanto ?...

Progres, estas gazeto redaktita en *Idiom Neutral* kaj publikigata en S. Peterburgo (10 paĝoj). Kredeble la unua gazeto en tiu ĉi lingvo. La aferò rimarkinda pri *Idiom Neutral* estas ke oni povas ĝin legi sen antaŭa lernado. Sed... la legado facila ne estas ĉio, en lingvo universala; la facileco de la lernado kaj skribado estas multe pli atentinda kaj ŝatinda. — La oficialaj cirkuleroj de *Idiom Neutral* (decembro kaj februaro) raportas longe pri la diskutado okazinta en la Paca Kongreso, pri la elekto de lingvo internacia por la Pacaj Kongresoj.

Socia Revuo. Sub tiu titolo aperas folieto, kies celo estas fondi revuon socian *pri ĉio, kio interesas la homan vivadon* !... Tio ŝajnas iom larĝa, ĉu ne ?... Tio rememoras nin pri la antikva difino de l'filozofio malnova : *traktas de* ĈIO *konebla, kaj de kel-kaj aliaj aferoj* !,.. En la folio III-a troviĝas longaj diskutadoj pri la *titolo* kaj *programo* elektotaj.

Inkoj de Stephens. Tiu ĉi grava firmo Angla dissendis al ĉiuj Esperantistoj leteron de D-ro Zamenhof, per kiu li petas, ke oni sendu al li sian nomon kaj adreson. Samtempe ĝi sendis presaĵojn angle kaj Esperante por diskonigi ĝiajn bonegajn inkojn. Por kuraĝigi la komercistojn Esperantistajn, la *samideanoj* devas nun aĉeti nur inkon de Stephen, kiel ili devas uzadi nur la plumojn kaj krajonojn de *Baignol kaj Farjon*, el Boulogne-sur-Mer.

Plisimpligo de l'Angla ortografio. Societo estas fondita, kun la helpo mona de S-o A. Carnegie, por la plisimpligo de l'Angla ortografio. Tiu klopodo estas plej interesa. En cirkulero unua (marta), oni proponas unuan paŝon, skribante laŭ la plej simpla maniero la vortojn kiuj havas du ortografiojn : ekzemple, sulphate, *sulfate;* draught, *draft;* etiquette, *etiquet;* omelette, *omelet*. La cirkulero donas ankaŭ aron da 300 vortoj kun du diversaj ortografioj, kaj proponas tuj elekti la plej simplan.

Lerta propagandisto en Belgujo. Okaze de la alveno de l'ĉefepiskopo en Hadinne-lez-Andennes, S-o Servais imagis meti sur larĝan banderolegon tiun ĉi enskribon en Esperanto *Saluton eĉ dankon ĉar ĉeestas l'Epikospo amata*. Oni ĝin metis super la pordo de l'loĝejo parokestra. Lia Episkopa Moŝto rimarkis la skribaĵon kaj petis informojn pri Esperanto. Reveninta hejmen, li rakontis la okazintaĵon en kunveneto de pastroj. Ni tre dankas S-on Servais pro lia sprita kaj fervora agado, kiu certe estos fruktodona. — *L'Instituteur Belge* publikigis tradukon de artikolo pri *Lernejoj en Manitoba*, verkita de S-o P. D. Hugon kaj jam publikigita en E. K. (N-o 9).

« **La Progreso** » Internacia Komercista Esperanta Societo, sidejo Frankfurt-a. M., neue Mainzerstr. 59, progresadas Ĉe ĝia fondo de kelkaj semajnoj ĝi havis cirkaŭ 100 membrojn, nun ĉirkaŭ 200, inter ili 8 firmojn. Ĉi sukcesis, gajni por ĝiaj celadoj la « Kaufmannischer Verein » kiu havas 17,000 membrojn kaj kiu publikigis en ĝia organo « Kaufmannische Zeitung » laŭvorte la tutan paroladon, kiun Sro Feyerabend faris ĉe la fondo de la societo. Plue, ĝi donis al la juna societo senpage instruejon por esperanta instruo. Ankaŭ urban lernejon la societo obtenis, por lernigi en tio Esperanton. Devas estis speciale akcentata ke la « Progreso » tute ne volas konkuri je la Esperantistaj Grupoj, — tri estraranoj de la Esperantista Grupo Frankfurt a.- M., inter ili la prezidanto Sro Küchler mem, estas ankaŭ en la estraro de la « Progreso ». En urboj en kiuj jam ekzistas Esperantistaj Grupoj. la « Progreso » rekomendas al siaj membroj uzi la lernkursojn de tiuj, ĉar ĝia ĉefega celado estas provizore *la propagando de Esperanto nur inter la komercistaro* kaj en tiu maniero, ĝi multe povas kelpi la agadon de la Esperantistaj Grupoj, kiuj hodiaŭ havas la malfacilan taskon de la propagando de Esperanto inter la plej diversaj homaj klasoj kaj profesioj. Kiu estas la homo kiu la plej ofte devas interkomunikiĝi kun la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj ? la komercisto ! Li do unue ekkonos la gravegecon de nia ideo kaj post la praktika konsidero de la moderna komercisto tre rapide malaperos la antaŭjuĝojn, kiujn ofte, tre ofte ankoraŭ renkontas

la ĝenerala propagando de nia afero inter la diversegaj profesioj.

Antaŭen do, la celo estas klara antaŭ niaj okuloj, ni ŝtreĉu ĉiujn fortojn por ĝin atingi !

Anglujo Leeds. 30-an de Junio 1905. « Estas kun grandega plezuro ke ni sciigas al la Esperantistaro, ke la plej grava komerca lernejo el la Norda anglujo, la *Northern Institute of Languages* decidis instrui senpage nian lingvon.

Sesdek-tri lernantoj enskribis sin, kaj Sro F. L. G. Maréchal, B. A. Sub-Direktoro de la lernejo, aŭtoro de la « *Tutmonda lernolibro* » por paroligi rapide Esperanton, faras la kurson ĉiumerkrede je la 4.30 p. t. m.

Estas granda honoro por la *Leeds'a Grupo*, ĉar la anglaj klopodoj ekkomencis de la *Northern Institute*, kiam Sro Charlier, persona amiko de Sro Maréchal, en tiu tempo francaj profesoroj ĉe la Norda Instituto, klarigis al nia honorinda Samideano Sro J. Rhodes el Keighley, la lingvon Esperanto.

La Leeds' Esperantistoj dankas multe al la agemaj Direktoro A. C. Poré kaj Sub-Direktoro F. L. G. Maréchal je ilia sindonemo al nia Sankta Afero. Ni esperas ke la aliaj anglaj komercaj kaj lingvaj lernejoj sekvos la ekzemplon. — Antaŭen al la celo ! »

— La metodo uzita de S-o Maréchal en lia « Tutmonda Lernolibro » estas ja plene rimarkinda kaj uzinda. Bedaŭrinde la libro enhavas tro multajn preserarojn, kiujn certe oni malaperigos en nova eldono.

Tutmonda labora Societo. — (amika unuiĝo de l'Esperaatistoj geoficistoj) fondiĝis en Parizo. La detalojn pri l'organizado ni ne povas publikigi hodiaŭ. Petu informojn de S-o P. Blaise, Sekretario, 4, rue Bourg-Tibourg, Paris.

BIBLIOGRAFIO

« **Tra la Mondo** » finis sian unuan ekzistan jaron kun la junia numero.

Kiel oni povis vidi per niaj monataj analizoj, la intereso de

tiu bela ilustrata revuo kreskis kun ĉiu numero, tiom per la valoro de l'artikoloj, skribitaj ĉiuj de anoj de l'landoj aluditaj, el kiuj multaj apartenas al la Lingva komitato, kiom per la beleco kaj multeco de l'ilustraĵoj. La 12 kajeroj, grand formataj, enhavas ĉirkaŭe 250 da ili.

Inter artikoloj pleje interesaj, ni signalu : « La Pasio » de kanoniko Petit, el Nancy ; « Esperanto kaj katolikismo » de nia kara Direktoro kun lia portreto : « La blindula kaj surdomutula instituto de Wolume St-Lambert » kun multaj ilustraĵoj,, de Luis Carlos; « Bonfaremeco » de Bino B. von Sŭttner, kun portreto, kaj Dro Hanauer ; multaj artikoloj pri la Geneva kongreso.

Cetere la 12a No, kiu enhavas la ĝeneralan ilustritan enhavon de la unua jaro, ebligos vidi, per unu sola ekrigardo, la intereson kaj la diversecon de la revuo. Kvankam enhanvata 24 paĝojn anstataŭ 16, ĝi kostas nur 0 fr. 75 c. Ĝi tute taŭgas por konatiĝi kun « L'Ilustrato » de l'Esperantistoj.

Por ĝin akiri, sufiĉas sendi 0 fr. 75 c. poŝtmarke al la administranto ; 15, Bd des 2 Gares, Meudon S.-et-O., France.

Memorante pri la belaj ilustritaj numeroj dediĉitaj al la Bulonja kongreso, ni instigas niajn legantojn certigi al si la posedon de l'Aŭgusta, Septembra kaj Novembra N-oj, dediĉota grandparte al la Geneva Kongreso (2 fr. 25 poŝtmandate).

Ni memoras ke oni aboniĝas *sen pluaj elspezoj* — por la tuta jaro — en la francaj poŝtoficejoj, aŭ ĉe la Direktoro de E. K.

Tutmonda jarlibro por 1906 jus aperis. Ĝi enhavas pli ol 30 000 nomojn kaj adresojn de Esperantistoj kaj konsistas et 506 paĝoj dense presitaj. Ni atentigas niajn legantojn pri la granda utileco de tiu propagandilo por la lingvo Esperanto, ĉar ĝi ebligas, ke la Esperantistoj facile interkonatiĝu, kaj ankaŭ ĝi montras la potencan disvastiĝon de Esperanto tra la mondo. Poŝtkarto estas enmetita en la nova eldono ; kaj dank' al ĉi tiu poŝtkarto oni povas sendi al la redakcio novajn aliĝojn aŭ ŝanĝojn de adreso, k. t. p, La kosto estas fr. 3, 50. Sin turni al la firmo Hachette kaj Ko, 79, boulevard Saint-

Germain, Paris (France) aŭ al ĝiaj riprezentantoj, ekster Francujo.

Don Juan au la Ŝtona Festeno, kvinakta komedio de Molière, tradukis Emile Boirac, rektoro de la Diĵona Universitato. La firmo Hachette per tiu nova eldono daŭrigas la tradukon de l'plej famaj francaj literaturaj verkoj. La nomo de la tradukinto sufiĉas por rekomendi la libron. (108 p.la — prezo ne estas montrita sur la libro).

Catalogue Général (Ĝenerala Katologo) de la Presa Esperantista Societo, (48 p., 0 fr. 15) France kaj Esperante redaktita enhavas la titolojn de ĉiuj eldonaĵoj esperantistaj kaj informojn pri la gazetoj.

Memento de la Grammaire Esperanto (Resumo plena de l'Esperanta gramatiko) kolekto de « Lingvo Internacia » 8 p., 10 centimojn. Tre utile por la varbado de novaj adeptoj.

Julio Cezaro, tragedio en kvin aktoj, de W Shakespeare, tradukita de D. H. Lambert, B. A. (Oxon). Verdatuke bindita, 85 p. ; prezo : 2 fr., 1 ŝ. 6p., M. 1, 50. Beleta eldono de la « Brita Esperantista Societo », 13, Arundel Street, Strand, London. — Mi plezure legis en tiu fidela traduko la faman paroladon de Bruto « Romanoj, patrujanoj, kaj amantoj !... »

English--Esperanto supplement (Angla-Esperanta Aldono al la vortaro), de P. D. Hugon (32 p. prezo ne montrita sur la libro). Ni plezurege anoncas tiun libreton de nia kunlaboranto, S-o Hugon. Ĝi enhavas radikvortojn jam aprobitajn kaj uzitajn, kiuj tamen ne troviĝas en ĉiuj vortaroj ; kiel ekz. kemiaj, gramatikaj, botanikaj, bestaj, geografiaj vortoj. La komerca terminaro estas speciale interesa. — Ni rimarkigos jenajn novajn radikojn : *limedo*, limette (citrus limetta) ; *tektono* (tectona grandis) ; *injamo* (dioscorea globosa) malkorekte nomita *ignamo* en la Esperanta-Germana Vortaro. Angle : *yam* ; Germane : *Yamswurzel* ; France : *igname*. Komparu : konjako, cognac) ; vinjeto (vignette). Inter komunaj vortoj ni trovas : doko (la internacia vorto angla *dock*,) kaj horuro (angle : horror, france horreur). Ni pensas, ke tiu libreto utilos kiam oni publikigos *plenan oficialan vortaron tute en Esperanto*.

Esperanto, broŝuro 32-paĝa, verkita de Th. Cejka kaj Jos. Krumpholc. Ni ricevis samtempe la 2-an kaj 3-an eldonon. — *Kredeble* ĝi estas propaganda broŝuro kaj lernolibreto por Ĉejkoj. (Bonvolu niaj amikoj sendi klarigan tekston Esperante' kiam ili sendas al ni librojn en fremdaj lingvoj ; alie ni ne povos kroniki tiajn eldonaĵojn).

La fundamentoj de l'Pacifismo, de Elie Ducommun, Ĝenerala Sekretario de l'Internacia Oficejo de Paco, el France tradukis Victor Dufeutrel. Broŝuro 32-paĝa, N-o 3-a de la *Libraro Pacifista*. (0 fr: 50). Tre grava libreto, kiu certe altiros multajn anojn al Pacifismo, igante ilin pli ĝuste koni la *verajn emojn de l'vera pacifismo*. Speciale interesaj estaj la ĉapitroj *Praktika programo de la pacamuloj* ; *Historio de la Pacifisma movado*,

Nova gvidlibreto por soldato en ĉiuj landoj, tradukis Fi-blan-go kaj Ludoviko. Eldonaĵo 32-paĝa de la asocio « Paco-Libereco ». Tiun libron kontraŭ la patrujoj, kontraŭ la armeoj kaj militoj, ni ne povas rekomendi, tial ke ĝi instigas al *malamo*, kaj konsilas kiel devon, *ribeladon* kontraŭ la leĝoj patrujaj. Ĝi estas specimeno de *malvera kaj malbona pacifismo*.

Grand Dictionnaire Français-Esperanto (Granda Vortaro Franca-Esperanta). Aperis la 2-a kajero, tre zorge presita ; donas la vortojn de *admirer* ĝis *alerte* (16 paĝoj). Oni povas ankoraŭ subskribi al tiu grava eldonaĵo ĉe *Presa Esperantista Societo* por 17 aŭ 18 fr., laŭ la manieroj de pago. La Vortaro formos du volumojn, ĉiu da 1000 paĝoj.

ABONMONOJ RICEVITAJ

Plenan abonon ni ricevis de

D-ro Cuvelier, Westmalle. — F. Lallemand, Dijon. — Societo Espero, Wladivostock. — Meltzer, Santiago (Chili). — Biant, Santiago (Chili). Estas *tri* Biant en Santiago; mi nescias kiu estas la aboninto ; bonvolu plenigi vian adreson. — F-ino. L. Petit, Vitry-s-Seine. — Grupo Esp. Murcia. — Martin, Ubeda.

— Evstifeieff, Budapesto. — S-ino Milsom, Bossey. — Sup. des Missionnaires de Marie, Anvers. — Serigiers, Anvers. — J. Wery, Flemalles-Grande. — S. S. Emilienne, Fosses. — Lefebvre, Paris. — Oever, Calcutta. — Chavet, Paris. — Haknsson, Abo (Finlando). — D-ro Javal, Paris. — Tellini, Udine (Ital.).

Plenigon de abono ni recevis de :

Bussuttil, Misido (Malto). — Espero Kataluna, Barcelono. — Van Oevelen, Zoersel, — Van Melckebeck, Anvers. — Esperantista Klubo, Praha. — Chairon, Paris. — F-ino Magnier Boulogne-s-Mer. – Jadeau, Mercurey.

MONOFEROJ POR E. K.

P-o Van Oevelen (Zoersel, Belg.) 2 fr. 50. — S. S. Emilienne (Fosses, Belg.) 5 fr. — A. Lefebvre (Paris), 2 fr. — D-ro Cuvelier (Westmalle, Belg) 2 fr. 50. — P-o Bianchini (S. Quirino de Pordenone, Ital. 1 fr. – P. Bavay (Havre) 25 fr. -- P. Evstifeieff (Budapesto) 5 fr. 50. — Sumo 43 fr. 50.

Antaŭaj donacoj 471 fr. + 43,50 = 514 fr. 50.

Restanta ŝuldo 700 — 514,50 = 185 fr, 50.

Fininte la 3-an jaron de E. K., ni plej sincere kaj kore dankas la malavarajn esperantistojn, kiuj nin helpis tiel sindoneme per siaj donacoj, kaj tiamaniere ebligis ne nur la daŭrigon de la revuo, sed ankaŭ ĝian egiĝon.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o J. Ellis, el Keighley (Anglujo), LECIONO VIII. — Ludo specimena, ĝis fino.

21. D — 2 Ĉ 21. Ĉ — 7 D
22. TR — 1 D 22. T — 4 T

...Bone ! Se B kaptas Ĉ-on, N fiksigos la D on per T-4 Ĉ, ĝin gajnante je la kosto de T kaj Ĉ — profitdona interŝanĝo !

23. R. — 2 T 23. TD—1T

N povus sendanĝere protekti sian Ĉ-on per 23... D — 4 Ĉ, ĉar se 24 D × D, Ĉ — 6 K (ŝak), atakante R-on kaj D-on, kaj gajnonte B T S-on.

24. T × Ĉ 24. T × S
25. R — 1 Ĉ

B devis akcepti la prezentitan interŝanĝon de 2 T-oj kontraŭ D, — egalan interŝanĝon. Rifuzante ĝin, li fartas malpli bone.

....25. T — 8 T (ŝak)
26. D × T 26. T × D (ŝak)
27. R × T 27. D — 5 T (ŝak)
28. R — 2 Ĉ 28. D — 4 Ĉ (ŝak)
29. R — 3 K 29. D × T
30. T — 1 ĈR

Se B metus T-on sur ian kv-on krom la tekstan, li ĝin perdos, ĉu tuj aŭ post ŝakigo de D. Provu tion.

....30 S — 6 R (ŝak)

Prave ; se D ŝakas, B R nur ĉirkaŭiras ĉirkaŭ KS.

31 R × S

Morte ; la S estis nur allogaĵo. Tamen pli-malpli baldaŭ B devas perdi, ĉar N povas gajni per la antaŭenmovado de siaj S-oj.

....31. D — 7 R (ŝak)
32. R — 5 D

Se R iras alien, D × S (ŝak) gajnus T-on.

...32. D — 6 D (ŝakm.)

La R ne povas elŝakiĝi ; tial la ludo finiĝas ; Nigro gajnis. La suprepresita estas specimeno de la ludado de lernantoj ; la notetoj estas tiaj rimarkoj kiaj profesoro povus fari dum la ludado. Utila ekzerco estas reludi la presitajn ludojn, kiujn oni trovos en ŝakgazetoj.

AVIZO GRAVA AL ŜAKLUDISTOJ

Diversaj leteroj montris al ni, ke la legantoj pli kaj pli interesiĝas pri la ŝakoj. Ni deziras fari specialan kunvenon de la ŝakludistoj en Genevo. Bonvolu do la ŝakamantoj sin konigi al ni antaŭ aŭ dum la Kongreso. La kunveno estos anoncata per afiŝo ĉe la kongreso.

PROBLEMO 8-a de (Steleto).
NIGRO 3 Pecoj.



BLANKO 8 Pecoj.
B. komencas kaj mortigas per la 3-a iro.

SOLVO DE PROBLEMO 7-a
(de Steleto).

1-a iro de B estas : D — 2KR

Se N 1 T — 2R	2 D — 5KRm
» » 1 S — 3Ĉ	2 D — 6KRm
» » 1 K — 3Ĉ	2 K — 7Dm
» » 1 S — 4Ĉ	2 D — 5KRm

Ĉiu alia iro de N estas facile respondata per unu el tiuj ĉi mortigoj. — Ĝuste solvis : S-o Rebouleau (Tours). Sendu la solvojn *rekte* al la Direktoro de E. K.

Presejo A. BARBOT, Tours. *Le Directeur-Gérant :* EM. PELTIER

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*) — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia.

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 *bis*, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Francl. 20 fr.) 110 paĝoj monate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

IL CITTADINO ITALIANO, duonmonata gazeto en Itala lingvo, raportas pri Esperanto kaj pri L. I. Enhavas bonegajn tradukojn de D-ro Josefo Loschi, Profesoro en Valombrosa *Reĝa Instituto Forsta*. Konsistas el 16 p. kiel *l'Esperantiste*. S-ro P-ro J. Meazzini, de Arezzo (Ital.) ricevis de la Direktoro la tas kon redakti la esperantajn aferojn, artikolojn, anoncojn, bibliografiojn, ktp., kaj eĉ ricevi la abonpagojn el eksterlando (jare 3 fr. 50).

LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

LONDONO; PENSIO por gesinjoroj, Moderaj prezoj. Oni parolas k. korespondas Esperante, Angle kaj France. — S-ino O'Connor, Esperanto House; 17, St-Stephen's Square; London-Bayswater.

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ, de ĈEFEC, 45, Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W. — Estas nun aĉeteblaj la angla, germana, franca, itala, hispana, rusa, kaj sveda eldono, kaj riceveblaj po 3 fr. 50 la centon (100). Ĉiulandaj poŝtsignoj estas laŭ efektiva valoro akceptataj. — Je la sama adreso POSTKARTOJ kun teksto kaj adreso de diversaj naciaj societoj esper. — Po 1 fr. 35 la centon (100).

LE COLLECTIONNEUR UNIVERSEL, Karto-Filatelista

kaj literatura revuo. — Konkursoj kun premioj, anoncoj senpagaj por l'abonantoj. — 10.000 legantoj Jarabono 2 fr. (en Francl. 1 f. 50). Specimen. 15 centim. Direktoro Cl. Guinot, 38, r. de Chalon, Le Creuzot.

La Revuo

Internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. L. Zamenhof

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura, ĝi enhavos : novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, zeriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povus naski disputojn estos malakceptita de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de Septembro 1906 okaze de la 2-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto: ĉiu numero, 0 fr. 50 ; jara abono, 6 fr.

Oni povas jam de nun aboni ĉe la Librejo Hachette et K°, 79, Boulevard Saint-Germain, Paris.

« TRA LA MONDO » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco, industrio ; militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoficejoj.

LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA. — Envahas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5e.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

VERKOJ de D-ro NOEL (aĉeteblaj ĉe Espero Katolika). — Ĉielo kaj Tero, de Byron, trad. 1 fr. 45. — Rolandkanto, trad. en versoj, 1 fr. 70 afrank. — Parolado pri la Metodo, de Descartes, litografiita verk , 24 p. en granda formato.